



I F E F - Internacia Fervoja Esperanto-Federacio



Fervoja mondo 2010/08

(mesaĝo de Jindřich Tomášek, 2010-jun-16)

El fervoja mondo 8/2010

Aŭstrio - Hindio - Nederlando - Francio - Britio - Svedio

Aŭstrio : El *Transalpin* fariĝos *Railjet* - Tradicia *EC*-trajnparo 162/163 „*Transalpin*“ el Vieno al Zuriko kaj Bazelo kaj reen restos verŝajne ĝis duono de junio 2010 konsistanta kun vagonaroj de svisaj, respektive aŭstraj fervojoj. Pli poste, sur tiu ĉi alpa trajntraseo grafikhorara trafikos ekskluzive aŭstraj trajnkompletoj *Railjet*. Kvankam temas pri novaj trakveturilaroj, ne devas tio signifi plibonigon por pasaĝeroj. En ĝisnunaj trajnkompletoj ja estas uzataj prefere panoramaj vagonoj de la kompanio *SBB*, eventuale kutimaj restoracivagonoj, kiuj en *Railjet* mankos.

Hindio : tra Kaŝmira valo trajnoj jam povas trakkii - Kiam en lastjara aŭtuno la ĉefministro *Manmohan Singh* „trajnekspedis“ la trajnon el *Anantnag* al *Quazigund*, li solene inaŭguris ekspluatadon sur la lasta, 18 km longa fervoja linioparto tra la valo de Kaŝmiro. Nuntempe la trafike izolita linio estos alligata al hinda fervoja reto en *Udhampur*, kaj ĝi tiamaniere permesos trafikan kunligon en ĉiu vetero inter la ŝtatoj *Džammú* kaj Kaŝmiro kaj restantaj partoj de Hindio, kio estis markita kiel ŝtata prioritato. Oni tamen devos finkonstrui 167 km longan linioparton inter *Udhampur* kaj *Quazigund*, apud kiu okazis malfruiĝo pro konstrumalfaciloj. Studoj por la fervoja linio kun larĝoŝpuro 1676 mm komenciĝis en la jaro 1997 kunlige kun esplorado de la postuloj por konstruado kaj prognozaj de la trafikdenseco. Detala konstrua studo de la malfacila traktraseado tra la montara tereno sekvis en la jaro 2001. Interesaĵo estas, ke *Quazigund* kun supermara alto 1722 m estas la plej alte situanta fervoja stacio kun larĝoŝpuro en Hindio.

Nederlando : elektra trakkado jam sur la tuta fervojlinio *Betuwe* - Vartrafiko inter la nederlanda haveno Roterdamo kaj internlando atingis

gravan plibonigon de la kvalito. Ekde aŭtuno 2009 sur la linio nomata *Betuwe* povas veturi trajnoj en elektra trakcio de nederlanda landlimo *Emmerich/Zevenaar* ĝis al stacio *Rotterdam-Maasvlakte* sen lokomotivŝanĝo. Sur la 160 km longa fervoja linio *Betuwe* ekzistis ĝis la lasta aŭtuno 40 km longa linioparto inter ranĝadstacio *Kijfhoek* kaj *Maasvlakte*, kiu devis esti surveturigata nur en sendependa trakcio.

Francio : grandrapidaj trajnoj por *Lyría* - Ĝis la fino 2013 komuna filia kompanio *Lyría* de Francaj Fervojoj (*SNCF*) kaj Svisaj Federaciaj Fervojoj (*SBB*) kun sidejo en Parizo deziras aĉeti dektri novajn grandrapidajn unuetaĝajn vagonkombinaĵojn en valoro 600 milionoj da svisaj frankoj. Por livero de la vagonoj, kiuj trafikos precipe sur trajnkurso Laŭzano – Parizo, estas anoncota publika konkurso. Kunlige kun tio oni spekulas, ĉu al la konkurso aliĝos la firmao *Alstom* kun siaj vagonaroj *AGV*, sukcese trafikantaj en Italio.

Britio : *Pepsico* pli multe uzos la fervojon - Brita produktanto de manĝproduktoj *Pepsico* anoncis, ke estonte ĝi transportos siajn produktaĵojn kun marko *Quaker* sur trakoj. Temas pri 600 km longa trajnkurso el la produktejo en skotlanda *Cupar* al stokejoj en angla *Lutterworth* en graflando *Leicestershire*. Laŭ donitaĵoj de la firmao oni tiamaniere povas ŝpari jare ĉirkaŭ 500 000 ŝoseokilometrojn. Tio ĉi respondas emision de 180 tunoj da CO². *Pepsico* lastjare decidis malaltigi je ĉiu tuno da produktoj emision de la dioksido CO² je 20%. Tiucele oni certigos ankaŭ kondiĉojn por pli efika plenkargado de kargaŭtomobiloj.

Svedio : *Green Cargo* forlasis transportperdojn - Entrepreno de Svedaj Ŝtataj Fervojoj por vartrafiko – *Green Cargo* – en la tria kvaronjaro 2009 sukcesis forlasi la perdozonon. Post longa periodo de ekonomiaj problemoj tiu ĉi trafika entrepreno atingis profiton en sumo de trakalkulitaj 6,4 milionoj da eŭroj de la totala spezo 428 milionoj da eŭroj. La plibonigon de ekonomia rezulto kun modera plialtigo de la transportitaj varoj kaŭzis konsekvenco de ŝpararanĝoj kaj novaj komercaj kontraktoj.

(*Kompilis Jindřich Tomášek*)

(*Reviziis D-ro Heinz Hoffmann*)